

## & Napoj:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 611 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Klarigo (\*): Napoleon' Bonaparte, fransa regnestro kaj granda militisto.>

### (#Melodio:

<:47> (

/do dore doTi LaSo FaMi; do doTi dore mifa so so; do dore doTi LaSo FaMi; do doTi dore mire do do;

(#Rekantaĵe: fa fami refa mi mire domi re redo Tire domi so; domi so; fa fami refa mi mire domi re redo Tire do do o)

)×13 )+

### (&Strofoj:

'1 /Jes! Dio estas saĝa viro ; Kaj kreis ĉion ĝustacele. ; Tre evidente, kun admiro ; Ni tion vidas senkandele!

(×:; **Kreskas la herbo en mia cerbo, kredas mi ne kompreni vin ; en memor' ; Grasas la floroj, pasas odoroj en granda verda kampo.**)

'2 Jen por la fiŝoj li komence ; Fluigis akvon en riveron ; Kaj por la birdoj bonintence ; Necesan kreis la aeron; .....

'3 Jen por kreskigo de l' terpomoj ; Li faris pluvon kaj sunhelon ; Dum li samtempe al la homoj ; Donacis pluv-kaj sunombreton! .....

'4 Li ellaboris speciale ; La homojn per zorgema mano, ; Pripensis ĉion ĝisdetale ; Laŭ vere tre genia plano: .....

'5 Por manĝa aŭ malmanĝa celo ; Li faris, – diras mi senmoke, – ; Perfekte majstre, sen modelo, ; En- kaj el-iron ĝustaloke! .....

'6 Al viro li por amindumo ; Donacis ĉarman junedzinon ; Kaj kiel ombron apud lumo ; Samtempe kreis... bopatrino! .....

'7 Sed foje Dio, kvankam ruza, ; Embarasiĝis miakrede, ; Kaj kvin minutojn li konfuza ; Restadis preskaŭ senrimede... ..

'8 Ĝi estis antaŭ jam jarcento, ; Li tiam faris, en kolero, ; Pro puno al la homa gento, ; Militan fajron sur la tero. ....

'9 Sed tiu fajro ne sukcesis, ; Ne flagris ĝi laŭ di-intenco, ; Kaj estis klare, ke necesis ; Rimedo arda pli potenca. ....

'10 Kaj Dio pensis en medito: ; "Jam ne utilos la petrolo, ; Por tia fajro al incito ; Ne plu sufiĉas mia Volo! .....

'11 Ĉu helpas eble roz-oleo? ; Ĉu grasa suko de l' olivo? ; Aŭ ĉu alia naŭz-oleo ; Revokos fajron al plenvivo? .....

'12 Ha! Jen la solvo, estas klare! ; En mia kel' troviĝas napoj ; Amase, kiujn ĉiujare, ; Tribute sendas miaj papoj. ....

'13 El tiuj napoj mi science ; Nun premos taŭgan la oleon!" ; Li teren sendis, konsekvence, ; Tuj bonaparte NAPOLEON\*!! .....